Jaro III/VII. 1 N-o (25) Oktobro 1925

Sennacieca Revuo

Monata Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda
Fondita en 1919

Literaturo-Scienco-Pedagogio

ENHAVO:

Nikolao Ĥrebtovski: Al la poetoj neŭtraluloj. — *A. Gastev:* Pli forte ol vortoj: Trad. *V. Kusmiĉ.* — *Edgar Poe — K. Balmont:* Sonoriloj kaj sonoriletoj. Trad. *S. Rublev.* — *Herminia zur Mühlen:* La Homo. Trad. *Senheredigito.* — *Kastelano:* Paradoksoj. — *N. Vladimiroviĉ:* Urso kiel komunisto. — *E. Spiridoviĉ:* Lingva Evoluo de Esperanto dum la lasta jardekkvino. — *H. Muravkin:* Glacia Ŝelo de tera atmosfero. — *Mark Starr:* Eksperimento ĉe Bournville.

Redakcio: 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5, Moskvo I (USSR)
Administracio: Rich. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz (Germ.)

REDAKCIA ANGULO

La tria jaro estas komencata . . Afereme, sen superfluaj vortoj, ni mallonge resumu niajn taskojn por la nova jarkolekto.

Nia programo: 1-e arta belliteraturo plej eble saturenda de la proleta sennacieca ideologio; 2-e — popularaj artikoloj de scienco kaj tekniko, kiel ilaro por kreo de nia nova mondepoko; 3-e — labora edukado.

Super ĉio — arda, flamanta vervo de l' energio kaj laboremo!

Antaŭ ĉio — celkonscia, seniluzia nepreco!

Dekdu kajeroj estas aperontaj dum la jaro — por ĉiuj dekdu jam estu preta la plano. La unua el dekdu kuŝas preta antaŭ vi — finplenumita produkto de la antaŭfiksita intenco. Restas dekunu realigotaj.

Tri el tiuj ĉi kajeroj jam havas certan specialan antaŭprojekton: la orienta (aperonta en januaro: *urĝe sendu materialon),* la virina (aperos en marto: preparu materialon!) kaj la junula.

La unua numero kuŝas preta kaj ĝi donas tonon por la tuta jaro. Estas rimarkebla la nova aranĝo: la superpaĝa fakindiko pli reliefigas nun la apartajn laborregionojn de nia revuo, la materialo prezentiĝas nun en pli difinita formo.

Novan subfakon ni enkondukas: la kritikan. Ĝi anstataŭos ĉe ni la bibliografian rubrikon, sed ĝi ne mekanike registros novajn librojn; en formo de literaturaj skizoj ĝi serioze ekzamenos ilian enhavon. *La eldonejoj tion atentu kaj bonvole sendu siajn eldonaĵojn por tia recenzo prienhava.* Kaj niaj k-doj sendu al ni kritikajn artikolojn ankaŭ pri la valoraj verkoj aperantaj en diversaj lingvoj.

Gravan problemon en la nuna jaro la pasinta kongreso metis por nia revuo — pritrakton de la lingva problemo. Hodiaŭ ni prezentas artikolon tiuteman de K-do Spiridoviĉ, kiu donas tre ĝustan bildon de la nuna stato de la problemo. Sed estas klare, ke por tiu ĉi nova fako estas bezonaj ne la artikoloj de momenta, rapide pasanta aktualeco, estas necesaj seriozaj kaj profundaj esploroj.

Principan problemon starigas en la nuna numero ankaŭ la poezifako. Sur la unua paĝo ni metas la versaĵon de K-do Ĥrebtovski kaj certe ĝi estas kvazaŭ nia programdeklaro. Per ĝi ni difinas nian rilaton al la arto sentendenca, „neŭtrala", kiu tre ofte estas senutila kaj eĉ rekte malutila pro sia dekadenca spirito.

Sed la vera, eĉ neŭtrala (t. e. ne havanta karakteron de klasbatalo) sed sana arto, kiu havas valoron de klasikeco, ne devas esti forgesata de ni. Al tia speco apartenas la presata poemo „Sonoriloj", tradukita de nia talenta K-do S. Rublev el Edgar Allan Poe laŭ la rusa variaĵo de K. Balmont. Similaj brilaj specimenoj de la vera arto estas nepre konsiderendaj de nia anaro.

Ni interrompas la konversadon ĝis la sekvonta kajero. Kaj vi do ne lasu vin ripozi — viaj manuskriptoj abunde venu al ni. La nova jaro de nia laboro estu fruktodona!

La Redakcio.



Monata Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda
FONDITA EN 1919

Literaturo - Scienco - Pedagogio

III/VII

JARKOLEKTO

1925-1926

Redakcio : 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5. Moskvo, I (USSR)
Administracio: Rich. Lerchner, Colmstr. 1. Leipzig O 27 (Germ.)

700.051-B Period.

TABELO DE L'ENHAVO

Belarta prozo.

Belyj, Andreo. - Peterburgo 1905. Prologo el romano. (El rusa) . 205
Bergiers, Leon. - La aliaj. (Orig.) 125
Epstein, Ŝaĥno. - La unua standardo de l'Internacionalo. (El juda) 147
Erenburg, Elio. - Kafejo «La Borso». (El rusa) 21
Fade, G. - Ĉu SAT-anece? (Orig.) 89
Gastev, A. - Pli forte ol vortoj. (El rusa). 1
Gogol, N. — Nevski prospekto. Fragmento. (El rusa) 203
Gorkij, M. - La vojo al feliĉo. (El rusa) 145
Heyermans, Hermann. - Virinoj rakontas. Fragmento el « La bona Espero ». (El holanda). . 110
Ivn, L. - Profesoro Krajon. (Orig.) 96
Kastelano. - Paradoksoj. (Orig.) 8
Korczak, J. — La animo de kapitalisto. (El pola) 28
Kutuj, G. — Fatima. Fabelo. (El tatara) 113
Kuzmiĉ, Vl. — Du el grandioza mondpatrio. (Orig.) 78
Labormarkoj — (El germana) . . 221
Libin, Z. — Kiun el ili ? (El juda) 138
London, Jack. — La neevitebla blankulo. (El angla) 41
— La revo de Debs. (El angla) 166, 186
Maĥmud.-Avaria kanto (El avaria) 69
Multatuli. - La historio de Saidjah kaj Adinda. (El holanda) . . . 64
Mühlen, Herminia Zur. — La homo. (El germana) 6
Neniu. - La dua nigra Unuamajo. Ili estis sesdek. (Orig.) 151
— Ŝia honoro - lia honoro. (Orig.) 115
Nikolski, R. - Tri festoj. (Orig.) . 156
Nokte. (El germ.). 139
Norkus, J. - Ni kaj la mondo. (El litova) 49
P-n, C. Hj. - La pastro estis kontraŭ. Travivaĵo antaŭ 27 jaroj. (El sveda) 160
Saadi. - Persa rakonto el « Gulistan ». (El persa) 61
Sen pasporto. (El juda) 112
Strindberg, Aŭgust. — La infero. (El sveda) 182
Ŝapovalenko, N. N. — Urbo sur ostaro. (El rusa) 197
Ŝiŝkov, V. — La speguleto. (El rusa) 62
Ŝolem-Alejĥem. - Tri kapetoj. (El juda) 226

Poezio.

Aleksandrovskij, V. — Ribelo (El rusa) 208
Balado pri Lenin kaj Li-Ĉan. (El rusa) 77
Bedny, Damiano. — Kapitalo. (El rusa) 108
Bezimenski, A. — Patrino. (El rusa) 136
Davidov, S. - SAT-marŝo. (Orig.) 30
Ebeling, L. - 1-an de majo. (Orig.) 159
El la japana revolucia poezio . . 84
Ĥrebtovski, Nikolao. - Al la poetoj neŭtraluloj. (Orig.) 1
I. E. — Leningrado. El laboristaj poeziaĵoj. (El rusa) 217
Isahakjan, A. - Abu Lala Mahario. Araba poemo. (El armena) 94, 129, 174, 184, 224
Ivn, L. — Laboristino. (Orig.). . 109
— Nia Unuamajo. (Orig.) 155
Ivnev, R. — Peterburgo. Fragmento. (El rusa) 216
Johansson, Karl. - Senlima lando. (Orig.) 165
Kalajev, Iv. — Unuamaja kanto. (El rusa) 150
Kirilov, V.—La unuamaja himno. (El rusa) 147
Lilienbach, J. — Trankviligite. (El estona) 27
Nekrasov, N. A. — La fervojo. (El rusa) 181
Norbert. - Saluton al nova pioniro. (Orig.) 164
Poe, Edgar — Balmont, Konstantin. - Sonoriloj kaj sonoriletoj. (El rusa) 4
Puŝkin, A. S. - Fondo de Peterburgo. Fragmento el « Kupra Rajdanto ». (El rusa) 202
Sao. — La verda kaj ruĝa steloj. (Orig.) 41

Literaturaj skizoj.

Bruin, G. P. de. - Hermann Heyermans. Skizeto pri liaj vivo kaj verkoj. (Orig.) 176
El la mondo de libroj. (El dana) 49
Ĵirkov, L. prof. - Iom pri avaria kanto. (Orig.). 72
Lunaĉarski, A. - Kiel naskiĝis la arto? (El rusa). 99
Vladimiroviĉ, N. - Urso kiel komunisto. Pri « Atta Troll » de H. Heine. (Orig.) 9

Sociaj problemoj.

Breslauer. — Pri la modaleco de l' virino. (El germana) 118
Jaurès, Jean. - La minkarbo kaj la tritiko. (El franca) 229
Leon, Daniel de. - La voĉrajto de la virino. (El angla). 120
Molok, A. I. - Virino de la Pariza Komuno. (El rusa) 105
Neugebauer, Paul. — Pri patrintago. (Orig.) 140
Raüber, Gertrud. - Novaj vojoj en juĝado de seksoj. (Orig.) . . . 134
Starr, Mark. - Kial kaj kiel britoj venkis Hindion. (Orig.) 68

Priskriboj.

Ciperoviĉ, G. - Estonteco de Leningrado. (El rusa) 218
Ĥolodkovski, V. — Malnova Peterburgo kaj nova Leningrado. (El rusa) 212
Rozenblat, Gregoro. - Oriento el la alto de aeroplana flugo. Impresoj pri la aviad-ekspedicio Moskvo-Ulan-Bator-Ĥoto — Pekino-Ŝanĥajo. (Orig.) 73

Scienco - Tekniko.

Demidjuk, G. - Iom pri glavoj kaj plugiloj. (Orig.). 35
— Kion rakontas la ĉielskrapantaj gigantoj. (Orig.). 51
— Pri energio. (Orig.) 232
Evstiféieff. N. P. - Pri kulturebla tersuprajô en Meza Ruslando. (Orig.) 32
— Pri la vojoj en Meza Ruslando. (Orig.) 34
Krjukov, Maksim. — Pensoj pri lingvo. (Orig.) 30
Muravkin, H — Glacia ŝelo de tera atmosfero. (Orig.) 17
Nemilov, A. V. prof. - Biologia tragedio de l' virino. (El rusa). 130
Spiridoviĉ, E. - Lingva evoluo de Esperanto dum la lasta jardekkvino. (Orig.) 14
Starr, Mark. - Geografio en historio. (Orig.) 193

Pedagogio.

Blonski, P. - Edukado kaj pedagogio en burĝa kaj proletaria socioj. (El rusa) 102
— Laborlernejo — kio ĝi estas? (El rusa) 38
La bonŝancoj infanoj de Derbyshire. (El angla). 142
La japana lernejo. (El franca) . . 86
Milonov, J. - Scienco kaj tekniko. Kelkaj konsideroj pri metodiko en la studado de prinaturaj kaj ekzaktaj sciencoj. (El rusa) . .
Spiridoviĉ, E. - La unua de majo en sovetia lernejo. (Orig). . . 161
Starr, Mark. - Edukada skemo de la Brita Laborist-Sindikataro T. U. C. (Orig.) 234
— La eksperimento ĉe Bournville Progresema burĝa fabriklernejo en Anglio. (Orig.). 18
— Metodoj de la brita edukado laborista. (Orig.) 178

Ilustrajoj.

Iom pri glavoj kaj plugiloj (3 bildoj, 1 desegn.). 35-38
Kafejo « La Borso » (2 desegn.) 21-24
Kion rakontas la ĉielskrapantaj gigantoj (2 bildoj, 2 desegn.) 51-53
Kolwitz, K. — Patrino 138
— Sufero 112
La bonŝancaj infanoj de Derbyshire (3 bildoj) 142-144
La eksperimento ĉe Bournville (3 bildoj). 18-20
Leningradaj bildoj . 197, 203, 206, 207, 212, 213, 217
Lodigin, S. - Etudoj (3 desegn.) . 109, 116, 125
Maserael, F. - Lignogravuroj 152, 157
Meunier, C. - Portlaboristo . . . 146
— Bareliefo. 148, 149
Mortigatoj por la homaro (japana desegn.) 84
Oriento el la alto de aeroplana flugo (3 bildoj) 73, 76, 77
Rozenblat, Gregoro (portreto). . 74
Desegnajôj 1, 60, 61, 89, 105, 145, 154, 165, 181, 211



Nova tarifo de jarabono al "Sennacieca Revuo"

valida de oktobro 1926

(La unuaj nombroj, kiuj ĵus sekvas la landnomon montras la abonprezon por membroj de SAT, — la nombroj inter krampoj la abonprezon por ne-membroj.)

Argentino **2** pes. (**2,50**); Aŭstrio **4** ŝil. (**5**); Belgio **13** fr. b. (**15**); Brazilio **4** milr. (**5**); Britio **3** ŝil. (**4**); Bulgario **80** lev. (**100**); Ĉekoslovakio **20** kr. (**25**); Danio **2,50** kr. (**3**); Estonio **250** mk. (**300**); Finnlando **25** mk. (**30**); Francio **13** fr. fr. (**15**); Germanio **2,50** mk. (**3**); Hispanio **4** pes. (**5**); Hungario **40.000** kr. (**50.000**); Italio **15** lir. (**20**); Japanio **1,50** jen (**2**) Jugoslavio **40** din. (**45**); Latvio **3** lat. (**3,50**); Litovio **6** lid. (**7**); Nederlando **1,50** guld. (**2**); Norvegio **3** kr. (**4**); Polio **3** zl. (**4**); Portugalio **12** esk. (**15**); Rumanio **120** lej (**150**); Sovet-Unio **1,25** rub. (**1,50**); Svedio **2,50** kr. (**3**); Svisio **3,50** fr. sv. (**4**); Usono **1** dol. (**1,25**).

Ankaŭ duon- kaj kvaron-jare abonebla. Poekzemplera prezo: **0,30** mk. g.

Richard Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-O-27, Germanio

Pagu prefere per ŝtataj monbiletoj en registrita letero. La germanianoj pagu al poŝtĉeka konto de la Administranto N° 6835.

La abono validas nur post pago kaj komenciĝas kun ĉiu jarkvarono.

Nova tarifo de jarabono al "Sennaciulo"

valida de oktobro 1926

Ĉiu abonanto ricevas senpage «LA LERNANTO»-n

(La nombroj kiuj ĵus sekvas la landnomon montras la abonprezon por membroj de SAT, — la nombroj inter krampoj montras la abonprezon por ne-membroj.)

Argentino **4,50** pes. (**5**); Aŭstrio **8** ŝil. (**10**); Belgio **30** fr. b. (**35**); Brazilio **10** milr. (**12**); Britio **7** ŝil. (**8**); Bulgario **180** lev. (**200**); Ĉekoslovakio **45** kr. (**50**); Danio **7** kr. (**8**); Estonio **550** mk. (**600**); Finnlando **60** mk. (**65**); Francio **30** fr. fr. (**35**); Germanio **6** mk. (**7**); Hispanio **9** pes. (**10**); Hungario **80.000** kr. (**100.000**); Italio **35** lir. (**40**); Japanio **3,50** jen (**4**); Jugoslavio **90** din. (**100**); Latvio **7** lat. (**8**); Litovio **13** lid. (**15**); Nederlando **4** guld. (**5**); Norvegio **7** kr. (**8**); Polio **8** zl. (**10**); Portugalio **30** esk. (**35**); Rumanio **250** lej (**300**); Sovet-Unio **3,50** rubl. (**4**); Svedio **6** kr. (**7**); Svisio **8** fr. sv. (**9**); Usono **1,80** dol. (**2**).

Ankaŭ duon- kaj kvaron-jare abonebla. Po ekzemplera prezo: **0,20** mk. g.

Richard Lerchner, Colsmstrasse 1, Leipzig-O-27, Germanio

Pagu prefere per ŝtataj monbiletoj en registrita letero. La germanianoj pagu al poŝtĉeka konto de la Admistranto N° 6835.

La abonoj validas nur post pago kaj povas komenciĝi kun ĉiu numero.



Al la poetoj neŭtraluloj

NIKOLAO ĤREBTOVSKI

Koroj subtilaj de la trubaduroj
ne trovos ĉe ni perlajn kolektojn.
Ni nin ne banis en helaj lazuroj,
en pitoreskaj, graciaj vortplektoj.

Niaj koroj lace sangogutas,
per fulgoj de fandej' kovritaj.
Kaj verslingvo nia krude krutas, —
naskis ĝin fabrikoj kaj militoj.

Vi sciu, ho mildaj estetikuloj,
parfumitaj kaj flutsonaj koroj;
nur aktualon vidas la okuloj
de nia muz', jugita de laboroj.

Vi — sub siringoj sidas belpoze,
fumojn incensajn spiras la pulmoj.
Ni — ĝuos poste ĉielon ripozan,
dume nin brogas skarlataj fulmoj.

Por markizinoj vi brodis sonetojn,
estetik-jukon vi gratis de burĝoj.
Ni — de la kruda real' ŝiris retojn,
iris al lukt' sub standardoj helruĝaj.

Grizas la mond', sed la proletlaboro
ĝin faros brila, juna ĉielarko.
Kaj fian belon, kreitan de la Oro,
fatale trafos historia sarko.

Marŝas ni en peze-paŝa iro,
per nia plum' knedante la konkreton.
Preparas vojon ni, mallertaj pioniroj,
al la post ni irantaj majstr-poetoj.

Irkutsk.

PLI FORTE OL VORTOJ

A. GASTEV

La smirga fako en la uzino estis izolita de l' laborejo per vitraj vandoj. La seka smirga kaj ŝtala polvo kuŝiĝis sur la fenestrojn kaj senbriligis ilin. Nenio estis videbla el tio, kion oni faris tie. Incendioj da fajreroj rapide eklumigadis la vitran kaĝon kaj sur la fenestroj trakuradis la ombroj ĉu de homoj, ĉu de fantomoj. Seninterrompa obtuza bruo eliris el la kaĝo.

La laboron ĉe la seka smirgo eltenis nemultaj. Jam post duonjaro la homoj ŝajnis duonmortaj, ili fariĝis palaj kaj neparolemaj. Homeca kaj viveca estis en ili nur la koleremo. Maksimume post jaro ili forlasadis la laboron. Ili kolektis la instrumentojn, ĵetis ilin salve al la vitra budo kun malbenoj, kraĉis kaj postulis maldungon.

Eltenis nur unu. Tiu estis la maljunulo. La ostoj liaj estis herkulesaj, la staturo — eksterordinare alta, la brusto — plej larĝa.

Iam li estis la plej bona luktanto en la urbo, la plej bela, li eĉ ŝajnis esti favorito de l' vivo.

Nun restis ĉe li la samaj herkulesaj ostoj, sed la muskoloj sekiĝis, la brusto enpremiĝis. La kapo lia komencis griziĝi, sed la polvo formanĝis la grizaĵojn kaj la hararo fariĝis cindrokolora.

La estro ŝatis trakuri la metiejojn ĵus antaŭ la fajfsignalo; li postulis ke oni finu laboron minutprecize je la dekdua.

Li enkuris iufoje en la smirgan kaĝon. Li malfermis la pordon kaj . . . ŝtoniĝis. Antaŭ li estis fantomo: alta fortulo, tute griza — griza vesto, griza kapo, grizaj vizaĝo kaj manoj. Sur la okuloj estis nigraj okulvitroj.

Homo, kutiminta al la fabrika bruo, povas tra la fera bruego aŭdi la malpezan knaron de la pordo: la maljunulo ĉesis la laboron kaj demetis la okulvitrojn. La estro rimarkis larmojn ĉe li.

— Ĉu vi ploras?

La maljunulo eksvingis la kapon kaj montris la polvon.

— Ha! Ĝi estas venena . . . — diris la estro. — Ĉu delonge vi laboras?

La maljunulo jam kelkjare al neniu parolis: la laboro kutimigis lin silenti, la seka brusto respondis per tusado al ĉiu vorto de l' maljunulo.

— Tridek kvin . . . — tradentigis li.

Lia voĉo ekŝajnis timiga al la estro.

Ĉe li tuje aperis la penso: ĉu li ne estas unu el tiuj, kiujn oni tenas por agitado en la uzino. Ili varbas homojn al sindikato, al partio; ili parolas dum la kunvenoj. Tiuj homoj povas ŝanceligi milionojn per sia eltomba voĉo.

— Diru, ĉu vi dum 1905 jaro ne partoprenis ĉe la mitingoj?

— Ne . . . — rompe respondis la maljunulo.

— Kaj vi ne estis deputito?

— Voĉo mankas . . . — raŭkis la respondo.

— La estro perdiĝis en konjektoj.

La ektusinta maljunulo ion eldiris, sed la estro ne komprenis.

— Vi devus ripozi . . . — diris la estro. — Mi klopodos por vi pri dumviva pensio ĉe la uzino.

La maljunulo skuis la kapon.

Li provis paroli, sed li ne povis.

Fine li venkis la pezaĵon, premintan lian bruston, kaj firme eldiris: Mi estas delegito.

— De kiu? . . . — timigite kaj mire demandis la estro.

— De tiuj . . . — montris la maljunulo al la tero.

— Sed de kiu? De kiu?

— De ili, kiuj foriris . . .

— Kien?

— Tien . . . — montris la maljunulo malsupren, sub la stablojn.

— En la tombon?

La transmisio ektremis, malpliigis ŝian tonon.

Ekbruegis la fajfilo.

La maljunulo forvestis la jakon.

La uzino haltis. Ekaŭdiĝis krioj, parolado kaj rido de la eliranta amaso.

La maljunulo, ne salutante la estron, rapide eliris el la kaĝo.

Mallaŭte iris la estro post li.

La maljunulo entranĉiĝis en la amason; li estis je la tuta kapo pli alta ol ĝi.

Tuj la krioj kaj rido forflugis.

La uzino mutiĝis. Kaj sub ĝiajn arkaĵojn, kiel en tomba kripto, fluis kaj batiĝis la tusado de l' maljunulo.

Li tiel obtuzbrue kaj surde tusis, ke lia tusado ŝajnis esti la plej perfekta parolo, la parolo de tiuj, kiuj estas en tomboj.

Kaj por momento ŝajnis, ke la uzino haltis ne pro la fajfsignalo, sed ke la radoj rigidiĝis pro tiu tusado.

Unu, unueca sopiro en la amaso. Eksopiris la gigant-uzino, kaj la smirga polvo, elpenetrinta el la kaĝo, mallaŭte trafis sur la kapojn de la homamaso. La amaso moviĝis, mallaŭtiĝinte, kvazaŭ subite perdinte la junecon. La paŝoj ĝiaj, malurĝigitaj kaj senritmaj, parolis pri tio, ke dum la vivo, iufoje, la plej ordinara eliro transformiĝas je procesio.

La maljunulo ĉi-fojon ektusis tiom forte, kiel neniam.

Li komencis sufokiĝi kaj, ĉirkaŭita de l' homamaso, ekfalis.

Kaj senagonie li mortis.

* * *

La maljunulon oni entombigis post du tagoj.

Ekmallaboris ĉiuj fabrikoj de nia "Nigra antaŭurbo". Oni ne laboris ankaŭ ĉe la naftominejoj.

Malintense, nur por konservi la fajron, brulis en la hejtejoj . . . La uzinaj tuboj fumis kaj staris sur la fono de la ĉielo kiel estingitaj kandeloj en la templo de l' kapitalo. La supraĵoj mutaj kaj nigraj ŝajnis funebraj gigantoj, klinintaj malsupren la kapojn.

La laborista amaso iris sen kantoj, sen preĝoj, kvazaŭ kondamnita je silento.

Nek vortoj, nek paroladoj estis diritaj.

Nek unu krono estis metita; ĉiuj sciis, ke la smirga polvo, kiu forportis la maljunulon, morgaŭ penetros en la tombon kaj pereigos la kronon, kaj la koro de la laborista amaso estos ankoraŭfoje senhonorigita.

Sur la tombon oni metis la smirgan ŝtonon, ĉe kiu laboris la mortinto; tio estis lia lasta deziro.

Sur la ŝtono per diamanto oni gravuris la surskribon:

"Al la agitanto de l' Nigra Antaŭurbo, nesciinta vortojn".

El la rusa tradukis *V. Kuzmiĉ.*

Sonoriloj kaj sonoriletoj

EDGAR POE — K. BALMONT

I

Veturiloj glitas for,
Glitas for!
Sonorilas gaj-sonor',
La arĝenta venta sono dolĉe plenas je langvor',
En la kanto sonbruanta tintas revo de l'ador'.
Ho sonoro diafana,
Kvazaŭ sona rid' infana,
En sereno de l' vesper'
Ĝi rakontas ke sur ter'
Post la tagoj de sopiroj
Venas dolĉo de l' admiroj
Kaj ni ĝuas la delirojn — la delirojn de l' esper'.
Veturiloj glitas for,
Sonorilas gaj-sonor',
Steloj aŭdas la parolon de sonanta trila ĥor',
Kaj aŭdante brilas or',
Kaj revante, kaj brilante naĝas en ĉiel-vapor',
Kaj en lum' varia-trema
En la ravo silentema
Kun sonoro, kun la kanto tintas revo de l' ador'.

II

Jen edziĝa gaj-sonor'
De la or'!
Kiom mildas la beato en la kant' de juna kor'!
En la nokto kaj trankvilo
Jes flamas la pupilo
Kun la hel',
El ondar' de kantoj-sonoj ĝi rigardas al ĉiel'.
El alvokaj sonoriloj
Plenaj je fabelaj triloj
Altiĝante kaj falante ŝprucas briloj kun ŝancel'
Kun mallum' kaj luma hel'
Kaj rigardas sen ribel'
Al estonto kie dormas senzorgeco kaj trankvil'
Kiun kantas melodio de la ora sonoril'!

III

Jen alarmas kupra son'
Kvazaŭ hurlas la demon'!
Tiuj bruoj, muĝaj skuoj laŭtas pri terur-malbon'.
Kvazaŭ petas helpi nun,
Ĵetas krion al mallum',
Al orel' de nokt' profunda.
Ĉiu bru' —
Jen mallonga, jen abunda
Komunikas pri detru',
Kaj ektimo pri tortur'
Tiel kreskas en terur'
Ke sonoroj disŝiritaj, nekapablaj al sonad'
Povas nur sin tordi, mordi kun la krio pri helpad'!

Nur petegi pri indulgo
Kaj al flamo, kaj al fulgo
Ĵeti ĝemojn pri kompat'!
Furioza fajr' purpura,
Surda kaj kun bru' terura,
En brulad'
Sur tegmentoj flugas salte
Jen pli alten, alte, alte,
Kvazaŭ diras sen kompat':
— Volas mi
Alten fugi, flagre fugi ĝis la luno kaj radi',
Aŭ mi mortos, aŭ momente kaptos lunon incendi'!

Ho alarm', alarm-sonor',
Se vi povas ĵeti for
Tiun fajron, tiun flamon, tiun brilon de kolor',
Tiun bildon de l'rabi',
Kiun vi sonorsciigas plore kun la ĝema kri'!

Mankas savo de l' kruelo,
Ĉie — flamo, fajra helo,
Ĉie — ardo kaj ribelo!

Via son',
La ĥaoso de l' infero,
Nin informas pri danĝero, —
Jen elkreskas malfeliĉo, jen forfluas kiel ond'.
Ni sentime kaptas ondojn en vibrado de l' sonor',
Kaj defalas, kaj metalas ĝemoj de la kupra ĥor'!

IV

Jen funebra vokas son',
Longa son' !
La maldolĉ-doloro sonas pri maldolĉa vivo-dron'.
Fera sono nun anoncas pri malĝoja tomba ŝton' !
Kaj nevole kun la trem'
Ni forgesas pri ĝojem'
Kaj ni ploras, rememoras, ke ni mortos ankaŭ mem.
Senindulge unutona,
Kvazaŭ voko regiona —
La funebra peza son' —
— La admon' —
Kiel ĝem' koler-dolora,
Larmeplora
Nun fariĝas longa bru'
Kaj ĝi diras, ke vivinto por dolor' ne vivos plu.
Sonoriloj ruĝe-flavaj
Al nepravaj kaj al pravaj
Nun ripetas pri la sort':
Ke la koron premos ŝtono, kaj okulojn fermos mort'.
Jen funebras torĉa flam'.
De la turo iu kriis, iu laŭtas en proklam',
Iu nigra staras jam,
Kaj ĝi ridas kun malam',
Kaj ĝi bruas pri la sam',
Sonorilon ĝi aliras,
Sonorilon bruan tiras,
Sonorilo ĝem-sopiras,
Ploras en trankvil-aer'
Kaj etende-longe diras pri la dormo en la ter'.

Tradukis S. Rublev (Odessa, marto 1924).

LA HOMO

HERMINIA ZUR MÜHLEN

Ĉar venis la vintro kaj neĝo rapidege turniĝadis super la frostiĝinta tero, la mastroj de la mondo ordonis al ĉiuj homoj, ke ili kunvenu pro granda homnombrado.

Venis la popoloj orientaj kaj okcidentaj, el la suda ardo kaj el la norda rigideco glacia. Maljunuloj kaj junuloj venis, sanaj kaj malsanaj. Riĉuloj alveturis per admirindaj ĉevaloj, per spiregantaj aŭtoj

antaŭ la grandan palacon, en kiu la mondmastroj oficis. Malriĉuloj aliraĉis lacaj, de la vojo lamigitaj. Kadukuloj estis alportataj per portiloj.

Malgranda nealta pordo kondukis al pompa ĉambrego, en kiu sidis tri homnombrantoj sur luksaj tronsimilaj seĝoj — du maljunuloj kaj juna viro.

Po unu la homoj devis trapasi la pordon kaj diri al la trio sian devenon, naciecon kaj nomi la landon, en kiu ili deziras vivi.

Estis noktiĝinta kaj la fortoj de la tri uloj elĉerpiĝis. En iliaj kapoj dancis la nomoj kaj "popoloj" kaj de muroj ĉambregaj denove reeĥis:

"Mi estas germano — ruso — serbo — judo —"

Iafoje iu diris fiere:

— "Por mi nacieco valoras neniom, mi estas socialisto, revoluciulo —"

Lasu eniri la lastan — ekmurmuris unu el la maljunuloj al servisto.

Altkreska viro maldikega eniris la ĉambregon, akompanate de juna virino graveda. Ŝi ne toleris esti haltigita kaj ĉar krom tio ili ambaŭ estis la lastaj — la trio permesis al ili kunan eniron.

La viro altabliĝis kaj la unua maljunulo demandis lin kiel kutime:

— Kiu vi estas?

Mirigite la viro ekrigardis, sed respondis nehezitante:

— Homo.

La trio rigardis konsternite unu la alian, ambaŭ maljunuloj pene subpremis la rideton.

La junulo intencis helpi al la fremdulo, demandante lin:

— Kiu popolo estas via?

— Ĉiuj popoloj de la tero estas mia popolo.

Unu el la maljunuloj senpacience levis la ŝultron:

— Kiun landon vi nomas via patrio?

— Ĉiun, loĝantan de homo.

— Kiu lingvo estas via?

— Ĉiu, en kiu sonas paroloj de amo kaj frateco.

La trio estis embarasita. Al kiu kategorio oni enregistru ĉi viron? Deve al la juna viro venis penso savanta:

— Via edzino estas graveda. Kio estos via infano?

Mirigite levis la okulojn la viro al la demandanto:

— Homo, kiel mi kaj kiel la patrino.

— Kie vi intencas vivi?

— Ĉie ajn, kie ni trovos laboron.

— Sed pro dio, — ekkriis ambaŭ maljunuloj kvazaŭ el la sama buŝo: — vi do devas aparteni al iu nacio?

Kaj kviete, kiel oni parolas al neprudentaj infanoj, respondis la viro refoje:

— Mi estas homo.

Ekkoleris la maljunuloj pro tio kaj forpelis la viron en la nokton. Ŝanceliĝante sekvis la ino juna, ĉar ŝia suferhoro estis proksima.

La trio restis por momento silente. Preskaŭ timego ekkaptis ilin. Poste unu kun moko diris per tremanta voĉo:

— Tiu stultulo. Homo! Homo . . . Kio estas tio? Ĝin oni povas enkategoriigi, enregistri en neniu fakon . . .

Kaj la dua maljunulo diris ironie:

— Lia edzino naskos homon?

La junulo estis tre serioziĝinta, liaj okuloj ŝajnis rigardi en malproksimojn. El ĉi malproksimoj refalis radi-brilo en lian rigardon. Li ripetis mallaŭte la parolojn de la maljunulo, preskaŭ kun timema respekto:

— Kaj lia edzino naskos homon . . .

Sed el lia buŝo ĉi paroloj sonis tute malsame . . .

El la germana trad. *Senheredigito.*

PARADOKSOJ

KASTELANO

Du virinoj staras antaŭ buĉejo. Unu el ili diras al la alia:

— Rigardu la bedaŭrindan bovidon, kiun oni baldaŭ buĉos. Tre belajn okulojn ĝi havas. Ĝi blekas, kvazaŭ ĝi volas voki la patrinon por helpi kontraŭ la kruelaj homoj.

— Jes, — respondas nun la alia: — ŝajne ĝi antaŭsentas sian baldaŭan morton. Estas vere, nur kruelaj kaj sensentaj homoj povas trankvile mortigi tian beston. Mi ne povus eĉ nur rigardi buĉadon de iu besto. Ni foriru!

Atendu momenton! Kun larmoj de kompato en la okuloj la unua nun rediras: — mi nur volas ankoraŭ rapide aĉeti funton da tiu ĉi bongusta kolbaso por nia hodiaŭa vespermanĝo.

En lernejo antaŭ leciono. Pli frue ol kutime en la klasĉambron eniras la instruisto, fumante cigaron. Kun severa mieno li vokas al si la 13jaran Karlon:

— Hieraŭ vespere mi vidis vin ĉe stratangulo kaj vi fumis cigaredon. Vi do scias, ke tio estas malpermesata por infanoj, — ankaŭ ĝi estas malsaniga por pulmoj. Nun diru al mi, kial vi fumis?

La pala timema knabo ne scias iun respondon je tiu ĉi demando. Sed la instruisto devigas lin per minaco de batoj je respondo. Fine, la knabo plorante diras:

— Mi fumis . . . ĉar . . . mi fumis . . . ĉar . . . la aliaj . . . ankaŭ fumis . . .

— Pro tio mi devas puni vin, diras la instruisto. Li formetas la brulantan cigaron kaj batas la knabon per bastono. Poste li tute trankvile daŭrigas sian fumadon.

Sur la trotuaro kuŝas militkriplulo. Mankas ambaŭ gamboj. Li petas almozon — ĉar la dankema — kara — patrio ne donas sufiĉe. Du sinjorinoj preteriras kaj ekhaltas por rigardi la bedaŭrindulon. Unu diras:

— Estas terure. La milito produktis multe da mizero. Mi jam tremas nun ĉe la penso, ke oni edukas infanojn por ke ili eble estu kripluloj pro malbenita milito.

— Vi tute pravas, — respondas la alia: — la milito estas la plej granda sensencaĵo en la mondo. Estas nur bone, ke la viroj, kiuj estis dum la mondmilito ĉe la batalfronto, en tranĉejoj por la interesoj de la kapitalistoj, nun ne plu volas scii ion pri nova milito.

— Jes, — rediras la unua: — ankaŭ mia edzo estis dum tri jaroj ĉe la fronto, dufoje vundita; li eĉ ne plu volas aŭdi la vorton "milito"; aŭdante ĝin — li tuj furioziĝas. Ho kiom multe tiam mi kun miaj infanoj preĝadis al la kara dio pri sana reveno de mia edzo. Sed atendu iomete ĉi tie, mi volas aĉeti la etan infansabron, kiun mi tie vidas en la montra fenestro, por mia kvarjara bubeto; jam delonge li deziras al si tian.

URSO KIEL KOMUNISTO

PRI "ATTA TROLL" DE HEINRICH HEINE

N. VLADIMIROVIĈ

La eldonejo de Ellersiek-Borel aperigis novan libron. La libro estas bona kaj la eldonejo ĝin reklamas. La reklamo estas tre impona. En "Germana Esperantisto" ĝi okupas preskaŭ tutan paĝon. En tiu reklamo ni legas:

— Ĵus alvenis ĉe ni: Heinrich Heine — Atta Troll: Somernokta songô. Traduko de Zanoni. . . .

— Heinrich Heine apartenas al tiuj germanaj poetoj, kies verkoj posedos eternan valoron. En siaj poemoj li donacas kvazaŭ tutan mondon, kaj ĉiam li tuŝas aferojn, kiuj koncernas la tutan homaron. . . .

— Atta Troll estas unu el la plej karakterizaj verkoj de Heine. Kiu ne konas ĉi tiun poemon, tiu ankaŭ ne konas la verkinton. . . .

— La "heroo" de la poemo, la urso Atta Troll, verdire ja estas mallerta komunisto, kiu fine estas konvinkata pri la absurdeco de siaj ideoj. . . .

— La tuta sociala problemo estas pritraktata en maniero, kiu memorigas pri Esperantismo. . . . .

Ankaŭ en la libro mem, en la antaŭnoto de l' tradukinto, ni legas:

— Hodiaŭ mi prezentas al la Esperantistoj tradukon de "Atta Troll", unu el la plej rimarkindaj poeziaĵoj de Heinrich Heine. La poeto mem nomis ĝin "la lasta arbarkanto romantika". . . .

Sekve al ni estas trudata konstatigo, aŭ almenaŭ tion pretendas la eldonintoj, ke la romantiko kaj la iluzioj pri la idealaj sociaj reformoj de la estonteco estis "unu fojon por ĉiam entombigitaj" eĉ de tia eminenta poeto-socialisto, kiel Heine. Konvinkiĝu do ĉiuj vi ankoraŭ unu fojon "pri la absurdeco de viaj socialaj ideoj"! Kaj por tion pruvi Heine estas vokata — kiel atestanto.

Bone! Sed antaŭ ol fari nian ekzamenon de la verko, por konvinkiĝi, ĉu efektive Heine ankaŭ kondamnis per "Atta Troll" la vantajn revojn de la homaro pri la sociaj reformoj, — ni mallonge resumu la enhavon de la verko.

La temo de la poeziaĵo estas — en formo de humora satiro kaj paradio — pri urso Atta Troll, kiun ekspluatadis ursdresisto, dancigante lin dum foiro kune kun ursino Nigra Mumma. Fine la urso subite forŝiregis sin de sia sklavkateno kaj forkuris en montaron. Tie li kuŝas en sia kaverno kaj filozofias, instruante al siaj ses geidoj, ke ili malamu la homojn, kiuj pretendas mondestrecon super la ceteraj bestoj sur la tero.

Mil diabloj! Tiuj homoj,
Tiuj ĉefaristokratoj
Malestimas la bestaron
Arogante kaj fiere,

Rabas niajn inojn, idojn,
Katenumas, eĉ mortigas
Nin, por fimarĉandi (— —)
Nian felon, nian korpon.

Atta Troll disvolvas tutan teorion pri la egaleco de la bestoj kun la homoj. Li trovas neniujn kvalitojn, en kiuj la homoj meritus esti pli preferindaj ol la bestoj.

Ĉu ne estas saĝaj hundoj,
Eĉ ĉevaloj, kalkulantaj
Tre ekzakte? Ĉu leporoj
Ne tamburas kontentige?

Ĉu kastoroj ne eltrovis
Specon de hidrostatiko?
Ĉu ne al la cikonioj
Oni dankas la klisteron?

Laŭ la ideo de Atta Troll — la naturo distribuis vivrajtojn egale al ĉiuj bestoj, do ankaŭ al la homoj, sed tiuj ĉi lastaj uzurpis ilin, kaj metis sin en privilegian staton. Amuze priskribas Heine tiun ĉi filozofion de la ribela urso kaj humore konkludas:

Plu ne volas mi raporti
Pri la egalec'-manio
De la urso, — kalkumnioj
Kontraŭ nia homa gento;

Jes, mi estas hom', — pli bona
Estas mi ol best' alia,
Denaskiĝajn interesojn
Mi neniam malkonfesos.

Ĉur finfine mem mi estas
Ankaŭ homo, — ne ripeti
Volas mi la sensencaĵojn
Ofendantajn la honoron.

En batal' kun best' alia
Mi fidele batalados
Por la homo, por la sanktaj
Denaskiĝaj homorajtoj.

Ho, certe, en la okuloj de tia "supera" estaĵo, kiel la homo, kreita laŭ la "dia" similo, tiaj atencoj kontraŭ la superaj homaj rajtoj administri la teron estas vera sakrilegio!

Tamen estas ne senfrukte
Por la homo, kiu estas
Best' pli alta, ke li sciu
Kion pensas malaltuloj.

Jes, malalte en malhelaj
Sferoj de la sociaĉo,
En malaltaj, bestaj rondoj,
Regas nur mizer' kolera.

Atta Troll kuŝas en sia mizera kaverno kaj arogante li neas la "ekzistantajn ĉiam de jarmiloj", "konfirmitajn eĉ de la naturscienco" superajn rajtojn de la homoj. La hom-avida, egoista besto — en konkuro kaptas ĉiujn havaĵojn de la tero kaj rabas ilin por si, malgraŭ ke laŭ la naturo li tion ne povas rajti.

La komuna heredaĵo
Iĝas hav' individua; —
"Rajtoj de la posedado" —
Oni diras — kaj "propraĵo"!

Ĉu propraĵo? Rajt' poseda?
Ne! — Rabado! Ne! Mensogo!
Tian ruzan sensencaĵon
Povis trovi nur la homo [1])

Kontraŭnature la homo vestis fremdan felon sur sian serpent-nudecon kaj el fremda felo faris al si *poŝon.*

Posedrajton ne ekkriis
La naturo, ĉar sen poŝoj
En la felo ja naskiĝas
Senescepte ni estaĵoj!

Eĉ ne unu el ni havas
Denaskiĝe tiajn poŝojn
En ekstera, korpa felo,
Por kaŝkovri la ŝtelaĵon.

Arde Atta Troll indignas kontraŭ la maljustaĵoj de la homo kaj, kuŝante en sia rifuĝejo, li inspiras al siaj idoj (kaj precipe al unu soloreluleto) "grandan erarideon, minacantan la kulturon kaj surteran humanecon".

"Idoj" — Atta Troll murmuras,
Sin turnante tien, reen
Sur kuŝejo sentapiŝa —
"Nia estas l' estonteco!

Se urs' ĉiu, ĉiuj bestoj
Pensus same kiel mi,
Per komunaj fortoj certe
Ni ja venkus la tiranojn"...

Porkoj, ĉevaloj, elefantoj, bovoj, lupoj, ŝafoj, simioj, leporoj — ĉiuj bestoj devas unuiĝi en konspiro kontraŭ la homa tiraneco. Tiam "falos la reĝim' ĝisnuna monopola" kaj estos fondita "regno de la tutbestaro" — sur "fundamento de la nepra egaleco".

Malbonodora, griza, mizera estas la kaverno de Atta Troll, sed alte, en hela lumo, en supraj ĉieloj ŝvebas la ravoplena animo de la urso kaj tie li vidas dion en aspekto de granda blanka urso, ĉirkaŭita de multaj sanktaj ursoj-termartiroj, dancantaj solene sanktan dancon ...

---

[1]) Komparante la esp. tradukon kun la rusa, mi ne trovis tiujn ĉi ok versojn en la rusa teksto, sed nur punktaron. Evidente la rusa cenzuro antaŭrevolucia opiniis tiujn ĉi ideojn tro danĝeraj, eĉ prezentate en ridinda formo. — *N. V.*

Tiel revantan Atta'n Troll oni tromprimede elvokas el lia rifuĝejo kaj plenan da esperĝojo pafmortigas el embusko.

Tiel falis la heroo,
Kaj li mortis. Sed senmorta
Post la morto li leviĝos
En la kanto de l' poeto.

Li leviĝos en la kanto;
Lia gloro paŝos for
Per troĥeoj kvarpiedaj
Tra la tuta vasta ter'.

Kaj li havos monumenton,
Sur la kampoj de Walhal',
Kaj surskribon sur la ŝtono
Jen en lapidara stil':

"Atta Troll. Tendenca urso . . .
Delogita de l' spirito
De l' epoko. Origine
"Sansculotte"[1] en arbar'.

Malbondanca; sincerecon
Tamen en la vila brusto.
Kelkafoje fiodora.
Ne talent', sed karaktero!"

Tia ĉi estas la enhavo de la verko. En ĉiuj linioj de la libro videbliĝas granda simpatio de l' aŭtoro rilate al sia amuza heroo; la pikoj ne estas mokoj, sed bonhumoraj ŝercoj; kaj klare, reliefe aperas antaŭ la legantoj la bona, bela *animo de l' urso* revema, persekutata kaj malfeliĉa. Sange vundas la koron la noblaj revideoj kaj la tragedia sorto de l' urso. Estas maldolĉa rido. Tiel oni ne verkas por mortige moki iun aferon. Tiel oni ŝercas nur, kiam la koro estas plenigita per akra bedaŭro pri iu karaĵo frakasita. Tiel oni ridetas, kiam mortas amita persono.

Se ni atente trarigardos la enhavon, ni ne trovos lokon, kie la ideoj de Atta Troll estus evidentigataj kiel nerealigeblaj. Certe, la neebleco de l' unuiĝo de ĉiuj bestoj kontraŭ la homo (ne parolante jam pri neunuiĝeblo de lupoj kaj ŝafoj) estas klara per si mem kaj ĝuste tial ĝi estas komika. Sed se la aŭtoro havus taskon montri fiaskinta tiun ĉi ideon, li montrus ĝian fiaskiĝon internan, sed ne krudan perforton super ĝi elekstere. Tial la fiasko de la *ideo* ne estas konvinkiva. Ankaŭ klaras el la enhavo, ke Atta Troll mortis en la kulminacia momento de sia revado, sed ne kiel "konvinkita pri la absurdeco de siaj ideoj", kion trudas al li la tro senceremonia eldonejo Ellersiek kaj Borel. Certe alian agmanieron ol la suprenomita sentakta fiago, vi ne povus atendi de la "neŭtrala" eldonejo, konata pro siaj tendencaj eldonaĵoj dum la mondmilito.

---

[1]) Senkulotulo, t. e. ano de la revolucia klaso dum la granda franca revolucio 1793, nomita tial, ĉar li ne portis la culotte'on de l' aristokratoj, sed longan pantalonon.

Ankoraŭ pli malĝentila evidentiĝas esti la insinuacio de la eldonejo, se en la sama libro ni tralegas la antaŭparolon de l' aŭtoro mem. En la antaŭparolo Heine rakontas pri la cirkonstancoj, inter kiuj li verkis "Atta Troll". Ĝi estis verkita en la jaro 1841, do en la epoko antaŭ la glora revolucia dato 1848, kiam unuflanke kreskis en la publiko la ribelemaj tendencoj kaj aliparte prosperis la tielnomata politika poeziarto. Laŭ sia progresema mondkoncepto Heine certe ne povis fari sian muzon "servistino de la kristana-germana nacieco" kaj ankaŭ, estante poeto lirika, ne povis jungi ŝin laŭ severaj postuloj de la politikaj doktrinuloj tiamaj. Tial en "Atta Troll" esprimiĝis kelkrilate kiel en la tono, tiel ankaŭ en la enhavo la protesto kontraŭ ambaŭ ĉi tendencoj. Tial estas klare, ke jam laŭ la unuaj fragmentoj, presitaj el "Atta Troll", oni kulpigis Heine "ne nur pri literatura, sed ankaŭ pri socia malprogresemo, eĉ pri mokado kontraŭ plej sanktaj homarideoj".

Ni vidas, ke la eldonejo Ellersiek-Borel ankaŭ kaptis tiun ĉi punkton, sed nur el alia politika tendaro al kiu tia "mokado" estas kontraŭe dezirinda, por batali kontraŭ la malagrablaj por ĝi ideoj. Cetere ni vidu, kion Heine respondas al tio:

— . . . Mia poemo eble estas riproĉinda. Sed vi mensogas, Brutus, vi mensogas, Cassius, kaj ankaŭ vi mensogas, Asinius, asertante, ke mia mokado trafas tiujn ideojn, kiuj estas valora akiraĵo de l' homaro, kaj por kiuj mi mem tiom batalis kaj suferis! Ne, — ĝuste tial, ĉar tiuj ideoj konstante sin prezentas al la poeto en plej brila klareco kaj grandeco, tiom pli nekontraŭstareble lin kaptas ridemo, kiam li vidas, kiel krude, maldelikate kaj mallerte tiuj ideoj povas esti interpretataj. Tiaokaze li ŝercas pri ilia laŭepoka "ursa felo". Ekzistas speguloj, facetitaj tiom erarige, ke eĉ Apollo en ili vidiĝas kiel karikaturo kaj instigas al ridado. Sed tiuokaze ni vidas nur pri la karikaturo, ne pri la dio.

Eble oni povas laŭ certa frazo el la supra citaĵo pretendi, dironte, ke tamen Heine mokis la "ursan felon", la mallertan kripligon de l' ideo. Sekve li kondamnis la urson. Ĉu vere? Sed ne kaj ne! La afero estas nur ŝerco, ne moko! Estas granda diferenco.

Ankaŭ konsiderinde estas, ke ĝuste en la persono de kruda urso, en la epoko de la kamparana revolucio, Heine pentris sian heroon de la liberiga ribelo kaj egaleca ideo. Tio estas tre signifa.

Tiel la originalaj paroloj de Heine mem la "absurdaj" ideoj de Atta Troll ricevas senmakule brilan aŭreolon. Plie — ili en la nuna tempo akceptis ankoraŭ pli grandan aktualan signifon, kaj ne vane la libreto estas aperigita ĝuste nun, kiam la testamento de Atta Troll, donita al lia unuorela fileto ĵure sur la sanga ŝtono de la Drudoj, moderniĝis.

Urso! U. R. S. S. Ĉu ne estas vi, kiu fine post longjara sklaveco forŝiregis vin el la katenoj kaj en densa arbaro instaligis vin? Ĉu

ne vi en via nesto lulas noblan revon pri la nova regno de l'egaleco, kiel Atta Troll? Ĉu ne vin oni ĉasas el ĉiuj flankoj? Ĉu ne estas vi, pri kiu Heine volis verki novan kanton, kiam li en "Atta Troll" skribis:

Iom poste mi raportos,
Kiel la ursid' plenumis
Sian ĵuron; nia liro
Gloros lin en noveposo.

La unuorela ido de Atta Troll plenumis sian ĵuron, faritan al la patro. La naivaj revoj de Atta Troll realiĝas pli grandskale, ol estis imageble.

La libro "Atta Troll" de Heine estas bona libro!

LINGVA EVOLUO DE ESPERANTO DUM LA LASTA JARDEKKVINO

E. SPIRIDOVIĈ

La prilingvajn decidojn de ĵus pasinta SAT-kongreso ni devas konsideri, kiel turnopunkton en historio de esperanta lingva evoluo. Ĉi-tio igas nin observi la lingvan evoluon de esperanto dum la lastaj 10—15 jaroj kaj fari necesajn konkludojn. Ĉi-tio donos, interalie, ankaŭ eblon ankoraŭ fojon kontroli, ĉu estas efika kaj ĝusta la vojo de l' natura evoluo, testamentita de Zamenhof.

Neniam ĝis nun esperanto tiel forte evoluis, kiel dum la pritraktata periodo. Esperanto dum la jardekkvino progresis en ĉiuj direktoj: aperis kaj rajtiĝis novaj afiksoj novaj radikvortoj, eĉ kelkiuj plisimpligoj.

Novaj afiksoj: La nombro de l' afiksoj en esperanto ĝis la pritraktata periodo preskaŭ ne ŝanĝis: sendispute ricevis plenan vivrajton nur unu sufikso *-aĉ*, kaj krome oni nur komencis provuzi la sufiksojn *-oz*, *-iv*, *iz*. La pasinta jardekkvino faris en ĉi rilato saltegon supren: dum la periodo la vivo plenrajte akceptis sufiksojn: -oz, -end, -i (kiel sufikso de lando). Malpli sendubaj estas, sed grandajn teoriajn disputojn jam ne aperigas sufiksoj -iz, iv, -atr kaj prefiksoj mis- kaj retro-. Ĉi sufiksoj jam aperis eĉ sur la paĝoj de iuj lernolibroj (certe, kun voko singardeme uzi ilin).

Kalkulinte la kvanton de ĉi novaj afiksoj, ni konstatas, ke la ĝenerala nombro de esperantaj afiksoj dum la periodo treege plimultiĝis (precipe, se ni komparos la plimultiĝon kun la samo dum l' antaŭaj periodoj). Tial esperanto, ŝajnas, nun povas en ĉi regiono fari grandan halton, dum kiu la vivo bone rekontrolos la afiksajn akiraĵojn.

Tabelo de pronomoj kaj proverboj. La tiel malamegata de idistoj tabelo dum la periodo ne nur ne malaperis, sed montris tian vivkapablon, ke ĝi eĉ plikreskis. En ĝi aperis *ali-* kaj *kelki-* vortoj. Kvankam ne ĉiuj formoj, derivataj de l' nomitaj vortoj nun estas praktike uzataj, tamen ili estas tiel kom-

preneblaj al ĉiuj kaj tute ne rompantaj la principon de l' tabelo, ke ilian eston en la lasta oni devas opinii sufiĉe stabila.

Oni devas noti gravegajn simpligojn, kiuj aperis ankaŭ en la tabelo: ni parolas pri *ĉi* anstataŭ ĉi-tiu kaj *ti-kiu, ti kiuj* anstataŭ *tiu-kiu*, *tiuj-kiuj*. En ĉi okazo ni havas gravegan ekzemplon de l' efiko, kiun faras parola lingvaĵo kaj ĝiaj prononcaj postuloj.

Novaj radikvortoj. Plej malmulte ni certe havas disputojn kaj bruparolojn pri novaj radikvortoj. La lastaj iel nerimarkeble penetras en niaj gazetoj; sufiĉas, se nova radikvorto estas eĉ unufoje aperinta en iu presaĵo, por bonintencaj vortaristoj tuj metu ĝin en vortarojn. Sed, interalie, nome pri ĉi-tio oni devas plejparte kriegi kaj disputi; nome ĉi-tie estas granda danĝero por nia lingvo. Kontraŭuloj de novaj afiksoj ordinare krias: "for idistajn afiksojn! ĉi-tion oni prenis el ido!" Kaj kriante tiel oni eraregas, ĉar esto en ido de ĉi *internaciaj* afiksoj (ni ĉi-tie tute ne tuŝas la demandon pri kvalito de ili) tute ne signifas, ke esperanto prenas ilin el ido. Sed kiam en la lingvon sensisteme enradikiĝas ofte sen iu serioza bazigo aro da novaj radikvortoj, tiam estis pli multaj motivoj paroli pri idistaj inkliniĝoj kvankam ni eĉ ne renkontus la proponitajn radikvortojn en idistaj vortaroj: rigardu do ne eksteraĵon, sed esencon! Se vi, ekzemple, proponas vortojn "majorito" kaj "minorito" (plimulto kaj malplimulto), vi riskas ĉi-tie en pli alta grado fali en idistan rondkavon, ĉar, enkondukinte kvankam tre internaciajn, sed paralelajn vortojn kun jam ekzistantaj en esperanto derivaĵoj, vi rompas la vicon da plej gravaj principoj en nia lingvo.

Tamen, la tasko de nia artikolo nun ne estas kritiko de erare enkondukitaj radikvortoj. Tial ni iru pluen kaj observu flue la konkeraĵojn de esperanto en regiono de radikvortaro, ĉar tie-ĉi ni havas ankaŭ grandajn kaj gravajn akirojn.

La radikvortaro de esperanto evoluis dum la jardekkvino jene:

1. En direkto de natura diferencigo de ĝeneralaj konceptoj, esprimataj antaŭ tio per ordinara esperanta vortfarado; ekzemple: anstataŭ "akvumi" nun oni diras: "irigaci"; al "flugilo" oni aldonis "alo" al "kuri" oni aldonis "fugi" ktp. ktp.

2. En direkto de logika pliprecizigo, forĵetante la formojn logike dubajn. En ĉi direkto plejparte efikis la novaj afiksoj, precizigantaj esperantan vortaron. Tamen, iuokaze ĉi-efikon havis ankaŭ enkonduko de aliaj aŭ tute novaj radikvortoj; ekzemple: anstataŭ "kreskaĵo" (logike tre duba vorto) oni nun diras "planto", vegetaĵo"; anstataŭ "brulo", "brulego", "dombrulo" — "incendo"; "vagonaro" — "trajno"; "komercaĵo" — "varo" ktp. ktp.

3. En direkto de plisimpligo kaj mallongigo de ekzistantaj radikvortoj. Ĉi-tie oni akiris vicon da valoraj atingaĵoj, laŭgrade liberigantajn nian lingvon de balasto, plejparte de troviĝantaj en multaj niaj vortoj sensencaj por ni latinaj sufiksoj. Ĉi-direkte la vivo daŭrigis laboron, kiun jam faris koncerne multajn radikojn Zamenhof mem kaj la kolektiva laboro de l' antaŭaj periodoj.

Ni nomu la plej gravajn ekzemplojn de ĉi simpligoj:

1. Forĵeto de l' finaĵoj *-aci*, *-ici*, *-uci:* ekzemple — apeli, ekspozi, opozi, evolui k. a. laŭ la modelo de l' oficialaj — agiti, atribui, deklami ktp.

2. Forĵeto de *-ia, -io:* ekzemple — irigaci, poligama, presbiopa k. a. laŭ modelo de l' oficialaj — demokrata, kalendaro, pluvo ktp.

3. Forĵeto de *-iisto*, *-iulo;* ekzemple — anatomo, biografo, geometro k. a. laŭ modelo de l' oficialaj — filozofo, geologo ktp.

4. Forĵeto de *-ika, -iki:* ekzemple — atlanta, eklekta, erota, fanata (fantaismo) k. a. laŭ modelo de: aŭtenta, aŭtomata ktp.

5. Mallongigo — *-kolo, -kulo*, ŝanĝitaj en *-klo*: ekzemple — oraklo, matriklo, perpendiklo k. a. laŭ modelo de l' oficialaj — binoklo, miraklo, spektaklo ktp.*).

6. Aliaj mallongigoj: forĵeto de *-ato*, ekzemple, rezulto; *-ario*, ekzemple proleto ktp.

Ni montris ĉi-tie nur kelkiajn ekzemplojn de bonaj akiroj de esperanto en radikvortaro. Kaj ŝajnas al ni, ke eĉ la ekzemploj sufiĉe montris, ke evoluo de esperanto ankaŭ en plibonigo, pliriĉigo kaj precizigo de l' vortaro estis dum la periodo tre grava kaj multdoninta.

Do ni jam vidis, ke esperanto dum la pritraktata periodo evoluis en ĉiuj rilatoj kaj direktoj kun grandega forto kaj larĝo. Tamen, oni devas konfesi, ke plejmulto de l' akiraĵoj, esploritaj de ni, kvankam jam konkeris por si rajton ne esti forpelataj el lingvaĵo de gazetaro, tamen *tutplene ankoraŭ en vivon ne eniris*. Ekzemple, ni prenu eĉ tiajn sendubajn sufiksojn, kiel *-end* kaj *-i:* ankoraŭ multaj esperantistoj ne encerbumis ĉiumomentan neceson de -end, ankoraŭ multegaj uzas, ekz., Francujo, Ĉeĥujo, Germanujo ktp. Kaj kion do ni parolas pri aliaj afiksoj, pri ali- kaj kelki-vortoj ktp. ktp.

Unuvorte, ŝajnas al ni, ke al ĉiuj estas tute certe, ke pasos ankoraŭ multo da tempo, por l' esploritaj, teorie jam konkerintaj por si akcepton novaj akiraĵoj de nia lingvo plene neforigeble eniru esperanton. Estas evidentaj ankaŭ, ke ĉi-fakto de neplena eniĝo de l' akiraĵoj en esperantistaj masoj signifas, ke ili ankoraŭ *ne estas tute kontrolitaj* de l' vivo, ke la vivo ankoraŭ donos siajn pliajn korektojn. Ni eĉ ne diras pri multegaj misakiraĵoj, kiuj ankaŭ dum la bruevolua periodo penetris esperanton: la vivo, esperende, dum sekvonta periodo bone kribrigos ilin.

La periodo de tiel brua evoluo de nia lingvo koincidis kun ankaŭ granda evoluo de esperantista proleta movado. La lasta fakto, interalie, estas unu el la kaŭzoj de tia torentsimila periodo de la lingva evoluo. Oni povas vidi ĉi-tion eĉ el tiu fakto, ke la lingva progreso de esperanto respeguliĝis *plejparte sur la paĝoj de proleta esperanta gazetaro (precipe de SAT)*, ke la novaj lingvaj akiroj havis praktikan provon en la maso de esperantistoj-proletoj.

La lingvaj decidoj de la lasta kongreso de SAT respeguligis humorstaton de l' proleta esperantista maso kaj montris, ke la lasta, kiel ni jam vidis, ankoraŭ ne povis tutplene percepti la akiraĵojn de l' lastatempa lingva evoluo kaj post farita granda progreso nun deziras haltiĝi iom por pli profunde absorbi siajn konkeraĵojn.

Tial ni, ĉu progresemaj, ĉu konservemaj kamaradoj, konsiderinte la momenton de la haltiĝo, devas ĉiujn niajn penojn igi por profunda prilaboro praktika kaj lasta kontrolo de l' akiraĵoj, kiujn donis al ni la evoluo de esperanto dum la lastaj jaroj. Ĉi-tiun laboron oni devas kunigi kun la ĝenerala utiligo de grandegaj internaj riĉaĵoj de nia lingvo, kiuj ne estas ankoraŭ aperigitaj praktike.

Kaj kiam ni tute enigos en la nomita praktika laboro, ni eĉ ne rimarkos, ke nia lingvo evoluos pluen ĝis plia perfekto kun pli malmultaj eraroj de movado. La plua evoluo iros nur per elaperigo de l' internaj valoroj de esperanto.

---

*) Ĉi supraĵn ekzemplojn mi prenis el P. Christaller. Deutsch-Esp-Wörterbuch 2 eld. 1923. Berlin.

GLACIA ŜELO DE TERA ATMOSFERO

H. MURAVKIN

La plej lastaj esploroj pri la arkta lumo (Nordlumo) permesas supozi, ke la tera atmosfero ne transiras pograde en la senaeran universospacon, plenigitan nur de elektromagnetaj spacaj kaj radiaj fortoj, sed estas limigita de glaciiĝinta globa sfero, konsistanta plejparte el gaseroj, precipe el tiuj de kristaliziĝinta nitrogeno. Sub ĉi sfero interpuŝiĝas niaj radio-ondoj, samkiel la konstante moviĝantaj aermasoj en la spaco, kies grando ampleksas nur kelkajn procentojn de la terglobo mem (dum la terradiuso longas 6000 km, la alto de la atmosfero estas taksata je 700 km). Oni povas nun imagi, ke dumnokte, kiam la sunradiado forestas, la firma sfero super la tero etendiĝas pli suben ol dumtage, aŭ ke ĝi almenaŭ sube estas pli konveksa (ĝibforma). Ja estas preskaŭ sendube, ke ĝia denseco kaj dikeco, samkiel ĝia relativa alto, estas influata de tiaj fenomenoj, kiel la tajdoj*) (forkaj alfluoj), precipe se oni atentas, ke dum 24 horoj ĉiu punkto de la sfero havas unufoje la maksimumon kaj unufoje la minimumon de suna surradiado.


La bazon por tiuj perceptoj liveris la esploradoj pri arkta lumo de profesoro *Lars Vegard*, kiu lastjare malsukcesigis la malnovan teorion pri la estiĝo de la arkta lumo; tiu ĉi teorio perceptis kiel bazon la pogradan senfinan maldensiĝon de gasoj en la supraj tavoloj de la atmosfero. Li pruvis per eksperimentoj laboratoriaj la verecon de l' supozo, ke nitrogenaj vaporoj ĉe treege malgranda temperaturo je alto 70—100 km kristaliziĝas, t. e. transformiĝas en firmajn formojn, per kio estas klarigata la verda koloro en la spektro de l' arkta lumo. La sama tavolo, kiu laŭ la esploroj pri la arkta lumo difinas la dislokiĝon de verdaj linioj, estigas verŝajne la bluan koloron de la ĉielo. Praktikaj esploroj, faritaj ĉe etaj temperaturoj en laboratorio, pruvis la ĝustecon de spektra analiza esploro de l' arkta lumo kaj la fakton, ke la verda koloro de nitrogenaj kristaloj ankoraŭ restas post la fino de elektra surlumado, samkiel la ĉielo de norda nokto longe lumas post kiam la arkta lumo ĝin trazigzagis.

Parto de la esploroj estis entreprenita en la geofizika instituto de *Tromsö* (Norvegio). El 35 spektraj linioj oni povis ne malpli ol 30 redukti je nitrogenaj kristaloj. La nitrogena tavolo pezas malpli ol la glacio kaj estas ŝvebigata per elektra radiado.

Se ni antaŭe opiniis, ke la aera ĉirkaŭvolvo efikas kiel mola kuseno, gardanta nian maljunan planedon en ĝiaj vojoj tra la universo kontraŭ danĝeraj alpuŝoj, ni nun devas ŝanĝi nian percepton pri la plej altaj tavoloj de nia atmosfero. Nian teron ni povas kompari kun ronda ovo, kie la ŝela ovo estas la glacia sfero, la ovoblanko — la gasa atmosfero kaj la firma tero — la ovoflavo.

Ĉiuj esploroj, faritaj ĝis nun por klarigi la veran konstituon de nia atmosfero estis plejparte laboratoriaj kaj teoriaj. La esploraj balonoj kun registriloj ne povas nun plialtiĝi ol je 50 km, ĉar ili krevas pro manko de sufiĉa aera premo en la alto. Ion certan ni nur ekscios, kiam la teknikaj rimedoj pliboniĝos tiomgrade, ke ni povos penetri en la plej altajn tavolojn de nia atmosfero.

*) La tajdoj ekzistas, sub influo de luna altiro, ne nur ĉe la maro, sed ankaŭ ĉe la solidaj terpartoj kaj ĉe la aero.



La Bournville Lernejoj

LA EKSPERIMENTO ĈE BOURNVILLE

PROGRESEMA BURĜA FABRIKLERNEJO EN ANGLIO

Mark Starr

Bournville estas bela loko, tre proksima al la urbego *Birmingham*. Ĝi estas la hejmo de la mondfama ĉokolad-firmao *Cadbury* (Kadberi). Mi intencas rakonti, kiel en la fabrikejoj tie la laboristoj ricevas edukadon, sanprizorgon kaj eĉ partoprenis en la administrado de la firmao. Sed ne forgesu, ke la Cadbury'a fabrikejo, la belaj loĝdomoj inter la arboj, la komfortaj hejmoj por la maljunuloj ktp. ankoraŭ restas kapitalista afero. Interalie ĝi pruvas, ke tre multe ekspluatas la ordinara kapitalisto. Sed la fondinto de la firmao estis abstinenca kvakero, ne diboĉulo, kiu malŝparas sian profitenspezon per lukso. La produktadon de kakao kaj ĉokolado ne interrompas la mistera krizo, kiel en, ekz., maŝinindustrio. Per bona varkvalito kaj saĝa reklamo (Bournville mem estas bonega reklamilo) la firmao tre sukcesis. Simile al *Robert Owen* antaŭ jarcento en lia kapitalista periodo, G. Gadbury konscias, ke „malsaĝe estas mortigi la anseron, kiu demetas oran ovon". La pli altaj salajroj ktp. avantaĝe por li allogas la plej bonan laboristaron.

La historio de la edukad-fako ĉe Bournville estas jena: de 1906 jaro neniu 13—16 jara persono povas labori en la Cadbury'a fabrikejo sen ĉeesto al kurso en vespera lernejo. Poste la aĝlimo estis altigita ĝis 18 jaroj (21 por metilernantoj kaj 19 por komizoj). La lernejojn plejparte subtenis la loka ŝtat-aŭtoritato. En 1913 jaro la dumvesperajn kursojn anstataŭis la dumtagaj. Ĉiusemajne ĉiu junulo, ĝis li (aŭ ŝi) estas 18 jara, devis ĉeesti kursojn dum $3^1/_2$—$3^3/_4$ horoj kaj la firmao pagis salajrojn por tiu tempo. De 1914 ĝis 1919 jaro la firmao aranĝis pluan dumtagan sendevigan kaj senpagan instruadon kaj triono de la studentoj volonte ĉeestis la lernejon. Funkciis de 1919 j. jena aranĝo:

Aĝo	Knaboj	Knabinoj
14—16	Du devigaj duontagoj	
16—18	Unu deviga duontago, unu nedeviga	
18—	Komizo ĝis 19 j. Metilernantoj ĝis 21 j,	Ĉeesto dum plua jaro laŭ plaĉo

La firmao de Cadbury nun provizas la gimnastik-kaj naĝ-instruistojn kaj la kostumojn necesajn; ankaŭ ĝi disdonas specialajn premiojn. La ŝtata aŭtoritato pagas la aliajn elspezojn. La lernoplano estas jena:

KURSOJ POR KNABOJ (14—16 JARAJ)

($7^{1}/_{2}$ horojn ĉiusemajne)

(1)			(aŭ)	(2)		
Angla lingvo	$1^{1}/_{2}$	horojn		Angla lingvo	$1^{1}/_{2}$	horojn
Aritmetiko	$^{3}/_{4}$	„		Aritmetiko	$^{3}/_{4}$	„
Geografio	$^{3}/_{4}$	„		Geografio	$^{3}/_{4}$	„
Historio	$^{3}/_{4}$	„		Scienco	$1^{1}/_{2}$	„
Laboreja Desegnado .	$^{3}/_{4}$	„		Maŝin-Desegnado . . .	$1^{1}/_{2}$	„
Lignolaboro	$1^{1}/_{2}$	„		Metallaboro aŭ Arto .	$1^{1}/_{2}$	„
Korpedukado	$1^{1}/_{2}$	„		Korpedukado	$1^{1}/_{2}$	„



Teknika Instruo en dumtaga klaso por Ĉarpent-Metilernantoj

KURSOJ POR KNABOJ (16—18 JARAJ)

(3) ($3^{3}/_{4}$ horojn ĉiusemajne)			(4) ($7^{1}/_{2}$ horojn ĉiusemajne)		
Praktika Desegnado kaj Matematiko	$1^{1}/_{2}$	horojn	Angla lingvo	$1^{1}/_{2}$	horojn
Angla lingvo	$^{3}/_{4}$	„	Matematiko	$1^{1}/_{2}$	„
Historio	$^{3}/_{4}$	„	Historio	$^{3}/_{4}$	„
Korpedukado	$^{3}/_{4}$	„	Elementa Elektro . . .	$1^{1}/_{2}$	„
			Aparat -Konstruo . . .	$1^{1}/_{2}$	„
			Korpedukado	$^{3}/_{4}$	„

KURSOJ POR KNABINOJ (14—16 JARAJ)

(1)			2)		
Angla literaturo . . .	2	horojn	Angla literaturo . . .	$1^{3}/_{4}$	horojn
Aritmetiko	$^{3}/_{4}$	„	Aritmetiko	$^{3}/_{4}$	„
Biologio	$^{3}/_{4}$	„	Psikologio	$^{3}/_{4}$	„
Gimnastiko	1	„	Gimnastiko	1	„
Naĝado	1	„	Naĝado	1	„
Natur-Studado	$^{3}/_{4}$	„	Arto aŭ Naturstudado kaj Historio	$1^{1}/_{2}$	„
Komuna kantado . . .	$^{3}/_{4}$	„	Komuna kantado . . .	$^{1}/_{2}$	„
Kunveniĝo	$^{1}/_{4}$	„	Kunveniĝo	$^{1}/_{4}$	„
Historio	$^{1}/_{2}$	„			

KURSOJ POR KNABINOJ (16—18 JARAJ)

(3)

Angla literaturo . . .	1	horojn
Historio aŭ socia virto	3/4	„
Gimnastiko	1	„
Hejmflegado k. kuracado	3/4	„
Kunveniĝo	1/2	„

(4)

Angla literaturo . . .	1	horojn
Historio aŭ socia virto	3/4	„
Gimnastiko	1	„
Patrinec-arto	3/4	„
Kunveniĝo	1/4	„

Ekzistas ankaŭ preparadklasoj, kamplernejoj, libertempaj lernejoj, sport-, vetur-kaj stud-kluboj, specialaj fakkursoj, bursarioj al universitatoj, Esperanta grupo kaj popularaj lekcioj. En 1922—23 j. j. la studintoj nombriĝis jene: en la lernejoj — 1369 Knabinoj kaj 549 knaboj; en la fabrikejaj fakkursoj kaj nedevigaj kursoj — 1416 studantoj.



Infanzorgo kaj Patrinecarto por pli maljunaj studentoj

Du edukadkomitatoj — la vira kaj la virina — administras la tutan aferon per ĉiumonata kunveno. En ĉiu komitato estas 2 direktantoj de la firmao, kiuj rajtas prezidi dum kunsidoj. Ankaŭ la firmao elektas 2 aŭ 3 spertulojn. En ĉiun komitaton la laborista kaj laboristina Fabrikej-Konsilantaroj elektas du anojn. Tiuj du komitatoj gvidas la stabon de 8 oficistoj.

Mi kredas, ke ni laboristoj povas iom lerni de la edukado en Bournville kaj el ĝia kunigo de industrio kun lernado. La inteligenta firmao jam spertis, ke mekanika ripeta laboro en moderna fabrikejo stultigas laboriston. Ankaŭ necesas kursoj, en kiuj sin preparas la komencanto, elektiĝas la lertulo kaj, pli grave, la bonfarto de la firmao ŝajne identiĝas kun la propra bonfarto de la laboristo. La reala rego restas en la mano de la kapitalista firmao. Ĉio *por* la laboristoj, nenio gajnita *per* ilia ago — jen estas la nova speco de bena aŭtoritato. Certe la brita ŝtato ne subtenus finance la edukadon al klaskonscio.

Sed la ordinara kapitalisto ne rigardas tiel antaŭen, kiel la Cadbury'aj firmaanoj. La insulo de *New Lanark* (fabrikejo de Robert Owen) ne limigis la maron de ekspluatado en la antaŭa jarcento, certe la eksperimento de Bournville ne longe prokrastigos la disfalon de la malsaĝa socia sistemo.

ATENTU!

Komencas la aŭtuno kun siaj longaj vesperoj. Sopiro al bona legaĵo estas konstatebla. Nun estas la plej favora momento, kiun vi, gek-doj, legantoj ne preterpasigu vane. Samtempe aperas la unua numero de la III. jaro de

Sennacieca Revuo

Kun la tre favora abontarifo kaj multampleksa enhavtabelo en lasta numero

propagandu! kaj varbu

novajn abonantojn. Nia Senn. Rev. kun sia multvalora instruiva enhavo, kiun atestas siaj kunlaborantoj, meritas la plej vastan disvastiĝon en la mondo.

Ĉiu varbu almenaŭ unu abonanton

ĈIU ESPERANTOPAROLANTA LABORISTO
LEGAS LA UNUAN SEMAJNAN
LABORISTAN GAZETON EN ESPERANTO

“SENNACIULO“

POSTULU PROVNUMERON ĈE
ADMINISTRACIO DE S. A. T.
LEIPZIG-STÖTTERITZ, COLMSTRASSE 1

Jarabono al “Sennacieca Revuo“

Argentino 3 pesos; Aŭstrio 5 ŝil.; Belgio 15 fr.; Brazilo 7 milr; Britio 60 penc.; Bulgario 100 lev.; Ĉekoslovakio 25 kr.; Danio 5 kr.; Estonio 300 mk.; Finnlando 30 mk.; Francio 15 fr.; Germanio 3 mk. or.; Hispanio 6 peset.; Hungario 3 or. kr.; Italio 20 lir.; Japanio 2 jen.; Jugoslavio 50 din.; Latvio 4 lat.; Litovio 7 lid.; Nederlando 3 guld.; Norvegio 5 kr.; Polio 3 zlot.; Portugalio 15 esk.; Rumanio 150 lej.; Sovet-Unio 1,50 rubl.; Svedio 3 kr.; Svisio 5 fr.; Usono 1,50 dol.

ABONU ĈE ADMINISTREJO:
RICHARD LERCHNER
COLMSTRASSE 1, LEIPZIG-STÖTTERITZ
(GERMANIO)

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)